# LIGILO

DE


BRAZILA ESPERANTO-LIGO

N-RO 18 - APR/MAJ/JUN 1993

## KARA LEGANTO

NI MOVIGU LA MOVADON !

Ni komparu nian movadon kun glaciinsulo, kies videbla porcio konsistas el la membroj kaj aliĝintaj asocioj, kaj kies enakva parto, pli granda kaj ne malpli grava, estas la ne membroj kaj la asocioj ne aliĝintaj al BEL. Ambaŭ porcioj, tre bonvole, iafoje eĉ tre efike, sed ĉiam kun grandaj energiperdoj trafas konstantan, tamen modestan progreson. Super la glaciinsulo estas BEL, kaj ĉiuj movadanoj konscias ke ĝi ne estas celo per si mem: ĝi estas instrumento kiun la esperantistaro uzu adekvate kaj inteligente por ke Esperanto okupu pli grandan spacon en nia socio. Ĉar estas ĈIES tasko labori tiucele, ni invitas ĈIUJN esperantistojn partopreni komisionojn por ellabori projektojn ebligantaj la plenumadon de difinitaj celoj, kiuj certe alportos pli grandajn rezultojn kaj atingojn por nia movado. Aliloke en nia bulteno vi trovos aron da sugestoj pri tiu temo, nomita "PROGRAMOJ/PROJEKTOJ", kaj konsiderante la laboremon, la entuziasmon de niaj esperantistoj, ni estas certaj ke, reage al ĉi tiu alvoko, ekde la 29-a BKE nia movado akiros novan aspekton ĉar ĉiu konscia batalanto faros sian parton por ke



NI MOVIGU LA MOVADON !

# LIGILO

Oficiala organo de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 03625  70084-970 Brasilia (DF) Telefono: (061) 226-1298

Aperas trimonate
Redaktas BEL-Estraro

ESTRARO DE BEL

Prezidanto . . . . . Néia Lúcia Souza
Vic-Prezidanto. . . Francisco Mattos de Oliveira
1-a Sekretario . . José Carlos Dorini Ramos
2-a Sekretario . . Wilson Álvares de Oliveira
3-a Sekretario . . Lício de Almeida Castro
1-a Kasisto . . . . Aymoré Vaz Pinto
2-a Kasisto . . . . Maria das Dores Góes

Kontrolkomisiono

Altino Araújo Vasconcellos
José Romão Filho
Paulo Ricardo Grazziotin Gomes

Anstataŭantoj

Adolpho de Miranda Silva
Ismael de Miranda e Silva
Maria Isabel Botelho Ramos

KOMITATANO "A"

Symilde Schenk Ledon

LIBROSERVO

Francisco Mattos de Oliveira
Adolpho de Miranda Silva

PERKORESPONDA KURSO

Francisco Mattos de Oliveira
Carlos Maria

INFORMADIKO

José Carlos Dorini Ramos
Wilson Álvares de Oliveira

ARKIVO

Cleto Galvão da Silva

# FONDAĴO ALMADA

La celo de Fondaĵo Almada estas finance subteni BEL-on rilate al specialaj projektoj. La Federacia Konsilantaro de BEL ĝin starigis dum la 28-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Anápolis julie/92. Ĉiaj donacoj estas bonvenaj, tamen, laŭ decido de FK tiu, kiu donacas minimuman kvanton samvalore al 26 usonaj dolaroj antaŭ la 29-a Brazila Kongreso (julio/93) iĝas kunfondanto de Fondaĵo Almada. Sube ni listigas la donacojn, kiuj ankoraŭ ne aperis en LIGILO kaj tre dankas al ĉiuj:

| | | |
|---|---|---|
| Caio Márcio Pereira Lyrio........... | Cr$ | 1.312.000,00 |
| Elias de Lima....................... | Cr$ | 1.200.000,00 |
| José Pedro Milagres................. | Cr$ | 300.000,00 |
| Lauro Jorge de Oliveira............. | Cr$ | 100.000,00 |
| Neima Cardoso Adorno................ | Cr$ | 1.215.780,00 |
| Paulo Roberto Siqueira Silva........ | Cr$ | 900.000,00 |
| Raul Conde (plia donaco)............ | Cr$ | 1.000.000,00 |
| Sebastião Pimentel de Assis......... | Cr$ | 1.000.000,00 |

Krom la donacoj per mono, BEL ricevis de S-no Onésimo da Costa e Faria 25 diskojn "Exercícios de Pronúncia", kaj de anonimulo 175 memgluajn plastojn kun la diro "ESPERANTO-Comunicação sem Imposicão" (ESPERANTO-Komunikado sen Altrudo). Laŭ la disvendo de la varoj, BEL ĝiros la koncernajn valorojn al F.A.

La speciala konto de F.A. ĉe Banco do Brasil enhavas ĝis la fino de junio la sumon de Cr$ 133.097.181,00 kiu samvaloras al US$ 2.500,00. Tio signifas, ke preskaŭ 1 jaro post la starigo de Fondaĵo Almada, oni sukcesis nur +- 12 % de la nuna prezo de ĉambro simila al tiu de BEL-sidejo, en la centra parto de nia ĉefurbo. Tamen oni devas obstine daŭrigi la kampanjon, ĝis kiam aperos plia vojo por havigi la sufiĉan monon.

Ankoraŭ rilate al la sumo disponebla en Fondaĵo Almada: ĝi estos aplikata tre baldaŭe en la konstruado de adekvata barilo ĉirkaŭ la tereno kiun BEL, kun granda ebleco, gajnos de la Federacia Distrikto. BEL-estraranoj jam faris plurajn rendevuojn kun aŭtoritatuloj en diversaj registaraj instancoj kaj laŭ la ĝisnunaj tendencoj ni emas kredi je la ebleco doni oficialan kaj definitivan noticon pri la gravega okazaĵo dum la 29-a Brazila Kongreso de Esperanto.

# TRA BRAZILO

BARRA MANSA (RJ)

Pere de ĝia Departemento pri Edukado, "Centro Cristão Espírita Zico Horta" funkciigas elementan kaj paroligan esperantajn kursojn sub la kunordigado de Inĝeniero Cyro Barbosa Lima kaj kun la helpo de la instruistoj S-roj Sírio Silva kaj Sérgio Justo.

BOA VISTA (RR)

La urba leĝfaranto Natanael Alves do Nascimento prezentis leĝan projekton celante ŝanĝi nomon de strato. Laŭ la projekto la nova nomo estos Strato de la Esperantistoj. La informon sendis al ni S-ro Raimundo Dourado de Souza, de kiu ni atendas baldaŭan komunikon pri la sukceso de la iniciato.

CAMPINAS (SP)

Kultura Centro de Esperanto partoprenis de la "XIV Semana das Comunicacões", de la 4-a ĝis la 9-a de majo, kun stando pri Esperanto. La evento temis pri komunikado kaj informadiko. En tiu urbo funkcias unu el la plej famaj Universitatoj de Brazilo, nome "UNICAMP", kiu donacis al KCE "elektronikan adreson" ĉe BITNET, internacia komputil-reto, kiu permesas rapidan komunikadon, nacie kaj internacie.

CAMPOS (RJ)

La esperantistoj de tiu grava urbo sukcesis konkretigi malnovan revon: la akiro de propra sidejo. Post multe da laboro kaj ofero la estraro de Campos Esperanto-Klubo jam povas kunveni en sia propra "domo" je Strato 7 de Septembro n-ro 490, 5-a etaĝo. Krome, la tieaj esperantistoj nune batalas por enkonduki Esperanton en la publikajn lernejojn pere de urba leĝo.

DIVINÓPOLIS (MG)

Laŭ letero de S-no Antonio Alberto Nunes "Centro Espírita Estudante do Evangelho" oficiale fondis sian Departementon de Esperanto kaj planis esperantajn kursojn en kvar niveloj.

FORTALEZA (CE)

Ĉiujare okazas Feria Kurso de Esperanto, gvidata de S-ro José Nertan Amorim Medeiros, kiu reage al nia peto "Integriĝo de la

ĵus bakitaj geesperantistoj al la movado" (Ligilo n-ro 17) sendis liston de la lastaj kursfinintoj. Dankon!

GOIÂNIA (GO)

Aprobita leĝo n-ro 7182 kiu temas pri la instruado de Esperanto en la urba lerneja reto kiel nedeviga lernobjekto. Tiu sukceso estas rezulto de laboro far de Kultura Esperanta Centro, kies prezidanto estas S-ro Dilmá Cavalcante Bandeira. Sekve al la aprobo, KEC organizis specialan kurson por prepari instruistojn de Esperanto. Tiucele ĉefrolis D-ro Carlos Lima Melo. Je la 19-a de junio en solena festo, kun la partopreno de BEL, okazis disdono de diplomoj, omaĝo al la leĝfaranto S-ro Elias Rassi Neto, aŭtoro de la leĝo, artaj aranĝoj kaj koketelo. Gratulon al la tieaj samideanoj!

PALMELO (GO)

Dank' al BEL-Perkoresponda kurso tiu urbeto jam havas sian esperantan loĝanton, S-ro José Antonio Cardoso. Tiu kursfininto sendis al ni leteron, en bonnivela esperanto, kaj interesan pentraĵon de Zamenhof, pentrita de li per kolorigitaj teroj. Jen viva pruvo, ke post la semado nepre okazas la rikolto.

PORTO ALEGRE (RS)

.Esperantista Societo de Porto Alegre havas novan estraron, kiu jam vigle agas. Krom aktivigi kulturajn kunvenojn kaj esperantan instruadon, ESPA ankaŭ lanĉis sian bultenon nomita INFORMILO. BEL gratulas kaj deziras sukceson al la skipon!
.S-ino Lucila Dávalos Fernandes intervjuita de Radio Pampa dum 50 minutoj propagandis Esperanton kaj BEL-on. Sekve de tio, pli da homoj interesiĝis pri la lernado de E-o tie. Imitinda laboro

RECIFE (PE)

.En tiu urbo okazis la VI-a Laborkunsido de Nordorientaj Esperanto-Asocioj, organizita de Brazila Asocio por Kursoj kaj Didaktiko de Esperanto, kun la apogo de Pernambuka Esperanto-Asocio. Ĝi estas unu el la plej gravaj eventoj en tiu regiono, kiu sin proponas pritrakti la komunajn problemojn, defiantaj la dediĉon kaj persiston de la esperantaj movadanoj.
.Nova estraro respondecas pri la funkciado de Pernambuka Esperanto-Asocio ĝis la jaro 1995. BEL gratulas la prezidanton, S-ron Hamilton Nery dos Santos kaj la ceterajn estraranojn.

RIBEIRÃO PRETO (SP)

Instituto de Homeopatio "Francois Lamasson", enkondukinte Esperanton ekde 1992, intencas stimuli la disvastigadon kaj utiligon de Esperanto kiel interlingvo en Homeopatiaj medioj. Per ĉi tiuj vortoj IHFL komencas cirkuleron sendita al la ĉefaj landaj organizoj de Ameriko, ĉef-delegitoj de ĉiuj Amerikaj Landoj kaj gravaj Esperantistoj izole, celante disvastigi la 54-an Tutamerikan Medicinan Kongreson de Homeopatio, okazonta en tiu bela urbo, de la 25-a ĝis 29-a de julio/93. Kadre de la kongreso, IHFL prezentos Esperanton kiel elektindan lingvon por tutmonda interkomunikado de Homeopatoj. Laŭdindaj estas la iniciato de D-ro Izao Carneiro Soares, prezidanto de IHFL, kaj la efika kunhelpo de samideanino Neusa Priscotin Mendes, kiu respondecas pri ĝia Esperanta Departemento. BEL gratulas la organizantojn de la Kongreso kaj reliefigas ilian peton por ke la Esperantaj organizoj sendu leteron al la adreso de IHFL salutante la kongresanojn kaj disponigante siajn poresperantajn servojn.

SÃO PAULO (SP)

La monata brazila revuo "Planeta" (Planedo) de junio/93 publikigis bonegan artikolon pri Esperanto verkita de Adonis Saliba. La inteligenta artikolo pravigas la nunan sintenon de BEL profiti la potencialon de la brazila esperantisto por starigi kompetentan kaj profesinivelan laboron en ĉiuj niaj agadkampoj.

TIMÓTEO (MG)

De la 13-a ĝis la 15-a de Novembro 1993 okazos la V REVA (Renkontiĝo Esperantista de l'valoj de la riveroj "Doce" kaj "Piracicaba"). Esperanta grupo Verda Homaro organizas la eventon, kun la helpo de esperantaj grupoj de Aracruz, Belo Horizonte, Caratinga, Governador Valadares, Ipaba, Ipatinga e Vitória.

VITÓRIA (ES)

Kapiŝaba Esperanto-Klubo eldonas novan bultenon. Ĝia nomo estas Krokodilo. Malgraŭ la titolo, nenia "krokodilaĵo" trovas loĝejon en tiu tutesperanta bulteno de KEK. De ĝi ni prenas raporteton pri tre interesa sperto travivata de D-ro Carlos de Farias. Li kreis originalan kurson por instrui Esperanton al 25 junuloj kies familioj havas socinivelon tre simplan, tiel ke kelkaj lernantoj estas analfabetoj. Krom Esperanto ili ricevas ankaŭ lunĉon kaj nociojn pri bonkondutaj manieroj.

## BALANÇO GERAL DA LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO EM 31.12.92

### A T I V O

| | | |
|---|---|---|
| **Circulante** | | |
| BANCO DO BRASIL-C/MOVTO.... | 8.659.180,56 | |
| BANCO DE BRASÍLIA-C/MOVTO.. | 914.698,12 | |
| BANCOS C/INVESTIMENTO...... | 24.326.430,83 | 33.900.309,51 |
| **Permanente** | | |
| IMÓVEIS.................... | 247.750.000,00 | |
| MÓVEIS E UTENSÍLIOS......... | 6.226.000,00 | 253.976.000,00 |
| **Realizável** | | |
| CONTAS CORRENTES............ | 13.487.807,61 | |
| LIVRARIA.................... | 103.535.779,72 | 117.023.587,33 |
| | | 404.899.896,84 |
| ====== | | ============== |

### P A S S I V O

| | | |
|---|---|---|
| **Circulante** | | |
| CONTAS CORRENTES............. | 8.753.912,55 | |
| CONTAS A CLASSIFICAR......... | 4.933.380,93 | 13.687.293,48 |
| **Patrimônio Líquido** | | |
| FUNDAÇÃO ALMADA.............. | 8.262.883,00 | |
| FUNDO SOCIAL | | |
| -Exercícios anteriores....... | 104.888.331,29 | |
| -Exercício de 1992.......... | 51.311.389,07 | |
| -Reavaliação do Ativo........ | 226.750.000,00 | 391.212.603,36 |
| | | 404.899.896,84 |
| ====== | | ============== |

Francisco M de Oliveira
Vice-Presidente

Aymoré Vaz Pinto
Tesoureiro

DEMONSTRAÇÃO DA CONTA "RESULTADO DO EXERCÍCIO" EM 31.12.92

## D É B I T O S

| | |
|---|---|
| Água | 232.300,00 |
| Condomínio | 4.657.283,60 |
| Cópia | 748.040,00 |
| Correio | 15.091.482,57 |
| Curso por Correspondência-Despesas | 3.368.160,00 |
| Descontos e Abatimendos Concedidos | 3.813.059,00 |
| Divulgação e Propaganda | 428.192,00 |
| Impostos e Taxas | 943.471,31 |
| Lanches e Refeições | 12.705.705,94 |
| Limpeza e Conservação | 1.231.081,00 |
| Luz | 608.369,06 |
| Material de Escritório | 3.986.994,00 |
| Representação de Jornais e Revistas | 13.914.108,31 |
| Representação em Congressos | 455.650,00 |
| Servicos Gráficos | 4.360.000,00 |
| Telefone | 2.687.014,00 |
| Transporte | 1.623.235,50 |
| Subtotal | 70.854.146,29 |
| Superavit transferido para FUNDO SOCIAL | 51.311.389,07 |
| Total | 122.165.535,36 |
| ====== | ============== |

## C R É D I T O S

| | |
|---|---|
| Anuidade | 27.727.550,00 |
| Curso por Correspondência-Receitas | 24.629.620,00 |
| Donativo | 7.902.860,66 |
| Juros e Correção Monetária | 3.639.825,00 |
| Livraria-Saída | 22.898.839,94 |
| Rendas de Congressos | 1.068.000,00 |
| Rendas de Investimentos | 15.589.040,51 |
| Rendas Extraordinárias | 18.709.799,25 |
| Total | 122.165.535,36 |
| ===== | ============== |

Francisco M de Oliveira
Vice-Presidente

Aymoré Vaz Pinto
Tesoureiro

## NOTAS EXPLICATIVAS

1. CONTAS A CLASSIFICAR - Trata-se de valores depositados por terceiros em nossa conta 402.706-X, junto ao Banco do Brasil S.A., sem identificação dos depositantes.

2. REPRESENTACAO DE JORNAIS E REVISTAS - O valor transferido para a Conta "Resultado do Exercício" decorre da diferença cambial entre as datas de recebimento e de remessa de valores referentes a assinaturas de jornais e revistas editados no exterior.

3. RENDAS EXTRAORDINARIAS - Valores recebidos do Banco do Brasil S.A., referentes à correção monetária de depósito em cheque não liberado na data correta e à diferenca cambial entre as datas de emissão e de cancelamento de dois cheques de ordem de pagamento para o exterior, tendo em vista o não recebimento dos mesmos por parte do favorecido (Universala Esperanto Asocio-UEA).

## PARECER DO CONSELHO FISCAL

Nós, membros efetivos do Conselho Fiscal, eleitos para o período de julho/92 a julho/95, tendo examinado o Balanco Geral da Liga Brasileira de Esperanto, a Demonstração da Conta "Resultado do Exercício", balancetes e comprovantes de receitas e despesas, e tendo julgado os mesmos corretos, somos de parecer que as contas da Liga Brasileira de Esperanto, referentes ao período de 01.01.92 a 31.12.92, devam ser aprovadas pela Assembléia Geral Ordinária, a ser realizada durante o 29.Congresso Brasileiro de Esperanto, no mês de julho de 1993 na cidade de São Paulo (SP).

Brasília (DF), 09 de junho de 1993

Altino A Vasconcellos — José Romão Filho — Paulo R D Gomes

# *FICHA DE ADESÃO - 1993*

Nome:.................................................[...........]

Endereço:.......................................................

Cidade:.......................................UF.......

CEP:..........--....... Telefone: DDD [ ]..............

Profissão.....................................Nasc:..../..../....

Escolaridade: [ ] 1º grau [ ] 2º grau [ ] superior

Data:..../..../.... Assinatura:..............................

## LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

[ ] SI-Sócio Contribuinte.................................................Cr$ ..................
(valor correspondente a 150 selos de carta comum)
[ ] SF-Sócio Familiar.................................................Cr$ ..................
(metade do valor da categoria SI)
[ ] SE-Sócio Estudante - somente para menores de 30 anos..............Cr$ ..................
(metade do valor da categoria SI)
[ ] SC-Sócio Colaborador.................................................Cr$ ..................
(a partir do dobro do valor da categoria SI)
[ ] SV-Sócio Vitalício.................................................Cr$ ..................
(30 vezes o valor da categoria SI)
[ ] Fundação Almada.................................................Cr$ ..................
(contribuição específica para aquisição de nova sede)
[ ] Donativo para as despesas gerais da Liga..............................Cr$ ..................

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (UEA)

[ ] MG-Recebe apenas o Manual s/movimento esperantista....................Cr$ ..................
(8 florins holandeses = 8 x 0.65 x valor 1 dolar comercial
[ ] MJ-Recebe o Anuário (Jarlibro).................................................Cr$ ..................
(20 florins holandeses = 20 x 0.65 x valor 1 dolar comercial)
[ ] MJT-Só para menor de 30 anos (= MJ + revista Kontakto)..............Cr$ ..................
(20 florins holandeses = 20 x 0.65 x valor 1 dolar comercial
[ ] MA-Recebe o Anuário (Jarlibro) e a revista Esperanto....................Cr$ ..................
(48 florins holandeses = 48 x 0.65 x valor 1 dolar comercial)
[ ] MAT-Só para menor de 30 anos (= MA + revista Kontakto)..............Cr$ ..................
(48 florins holandeses = 48 x 0.65 x valor 1 dolar comercial)
[ ] DM-Recebe Anuário(Jarlibro) e revista Esperanto toda vida..........Cr$ ..................
(1.200 florins holandeses = 1.200 x 0.65 x valor 1 dolar comercial)
Obs: enquanto menor de 30 anos recebe revista Kontakto

Total.................................................Cr$ ===============

# BEL-ANGULO

Ĉiu konscia esperantisto havas sur sia ŝultro gigantan taskon: disporti la mesaĝon, la proponon kaj la instruon de E-o al ĉiuj homoj kapablaj akcepti kaj praktiki la ideon de lingvo internacia. Tiuj homoj estas ĉie, kvankam ili ne estas la plej granda parto de la homaro nuntempe. Granda kvanto da aktivuloj laboras senĉese kaj senlace tiucele, sed la rezultoj ne respondas la laboron kaj la lacecon. Por trovi novajn esperantistojn kaj, kio estas pli grave, restigi ilin en la movado, estas necese ke ni analizu niajn nunajn labormetodojn, por fari la eblajn modifojn kaj surbaze de kompetentaj studoj starigi planojn kaj ellabori projektojn por pli efike plugi la grundon kaj rikolti pli grandajn fruktojn. Kompreneble, BEL-estraro sola ne kapablas agi en la multflankaj kampoj de nia granda batalo, kiu postulas la disciplinon de bone kunordigita armeo. Kaj se ni ne devas malkuraĝigi la izolajn agojn de sindonaj samideanoj, kiuj kvankam tre malgrandskale rezultigas progreson, ni nepre laboru laŭ modernaj metodoj por fari pli grandajn paŝojn antaŭen. BEL devas plenumi sian fundamentan funkcion kaj profiti kaj kunordigi la potencialajn kapablojn de la brazilaj esperantistoj. Do konsiderante la spiriton de la ĉefartikoloj de ĉi tiu Ligilo kaj de la antaŭa (Ni movigu la movadon! kaj Ni laboru kune!), ni invitas ĉiujn aktivajn, kompetentajn kaj bonvolajn esperantistojn partopreni nian iniciaton nomita Programoj/ Projektoj, kie Programo estas la aro da konstantaj funkcioj kiujn BEL devas plenumi por atingi siajn laŭstatutajn celojn, kaj Projektoj estas aro da specifaj portempaj aŭ konstantaj agoj por efektivigi ĉiun Programon. Nia propono estas ke la esperantistoj, individue aŭ grupe ellaboru la projektojn, laŭ siaj fakaj konoj aŭ spertoj, tiel ke la kontingento de laborantoj estu pli granda kaj la rezultoj pli efikaj. Ĉiu projekto havos propran strukturon, konsistanta minimume el la sekvantaj eroj: difino de la dezirata celo; agadplano por atingi tiun celon kaj por havigi la necesajn homajn, materialajn kaj teknikajn rimedojn; budĝeto en usona dolaro. La projektojn ricevotajn ni transsendos per kserokopioj al Federacia Konsilantaro por kunhelpi en la preparo de Strategia Plano, tiamaniere ke ĝi spegulu la volon kaj la potencialon de la brazila esperantistaro, rilate al la sekvenda vojo. Do ju pli da variaj projektoj ellaboritaj, des pli ampleksa estos la Strategia Plano. La Programojn kaj Projektojn elektitajn de BEL-estraro ni nun listigas. Kompreneble la aro ne elĉerpiĝas ĉi tie. Fakte ni atendas sugestojn, ĉefe de la fakuloj, kaj esperas ke la reagoj de la esperantistoj signifu markon de nova erao, por ke la movado ne nur pligrandiĝu sed ankaŭ pliboniĝu, laŭmezure ke la amatoreco estu anstataŭita de profesinivela sintenado.

PROGRAMOJ/PROJEKTOJ DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

PROGRAMO: Informado (Diskonigi E-on al ĝenerala publiko)

PROJEKTOJ:
- .Diskonigo per TV, radio kaj gazetaro
- .Diskonigo per presaĵoj (Faldfolioj, Libretoj, Afiŝoj, Ŝildoj, Cirkuleroj ktp)

PROGRAMO: Instruado (Instrui E-on en diversaj medioj)


PROJEKTOJ:
- .Esperanto-kurso por infanoj
- .Esperanto-kurso por duagradaj lernejoj
- .Esperanto-kurso por universitataj medioj
- .Esperanto-kurso por publikaj entreprenoj
- .Esperanto-kurso por privataj entreprenoj
- .Esperanto-kurso por religiaj medioj
- .Esperanto-kurso por sindikatoj
- .Esperanto-kurso per televizio
- .Esperanto-kurso per radio
- .Esperanto-kurso per gazetaro

PROGRAMO: Varbado (Allogi simpatiantojn/apogantojn)

PROJEKTOJ:
- .Agadplano ĉe nacia parlamento
- .Agadplano ĉe ŝtataj kaj urbaj konsilantaroj
- .Agadplano ĉe politikaj partioj
- .Agadplano ĉe religiaj medioj

PROGRAMO: Rekta Agado (Specialaj Projektoj)

PROJEKTOJ:
- .BEL-Revuo "Brazila Esperantisto" ( Administrado, financa subteno, tekniko)
- .E-o ĉe Ne Registaraj Organizaĵoj (Aro da agoj por konkretigi la 14-an rekomendon de la Etika Kompromiso aprobita dum ECO-92, kiu temas pri ĝenerala adopto de E-o inter NRO-oj)
- .E-o dum la Olimpikaj Ludoj de la jaro 2.000 (Se Brazilo estos elektita por ilin okazigi)




# STATISTIKO

Ekde ĉi-tiu LIGILO ni prezentas statistikajn informojn ĉu koncernaj BEL mem ĉu koncernaj al la enlanda movado, por ke ĉiuj legantoj akompanu la evoluon de Esperanto en Brazilo. Memkompreneble la informcelon ni trafos nur se la ŝtataj asocioj, regionaj delegitoj de UEA kaj respondeculoj pri gravaj esperantaj eventoj regule sendos al BEL informojn por publikigo en ĉi tiu rubriko.

## BEL-anoj 1993 laŭ Ŝtatoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| Acre | 1 | Alagoas | 4 |
| Amapá | 1 | Amazonas | 1 |
| Bahia | 7 | Ceará | 2 |
| Distrito Federal | 32 | Espirito Santo | 7 |
| Goiás | 9 | Maranhão | 0 |
| Mato Grosso | 1 | Mato Grosso do Sul | 3 |
| Minas Gerais | 39 | Pará | 3 |
| Paraíba | 7 | Paraná | 13 |
| Pernambuco | 12 | Piauí | 1 |
| Rio de Janeiro | 82 | Rio Grande do Norte | 1 |
| Rio Grande do Sul | 20 | Rondônia | 0 |
| Roraima | 0 | Santa Catarina | 2 |
| São Paulo | 83 | Sergipe | 2 |
| Tocantins | 0 | Entute | 333 |

KORESPONDADO 1993
.Leteroj ricevitaj: 671 .Leteroj senditaj: 804

SERVOJ 1993
.Perado de 205 UEA-membriĝoj
.Perado de 158 abonpetoj de revuoj/gazetoj
.Libroservo: 316 fakturoj faritaj

## DONACOJ POR FONDAĴO ALMADA LAŬ ŜTATOJ

1 (AM), 1 (AP), 2 (BA), 13 (DF), 6 (GO), 3 (MG), 1 (PB)
5 (PR), 2 (PE), 15 (RJ), 1 (RN), 1 (RS), 1 (SC), 12 (SP)



# *LASTE APERIS. . . sur nia bretaro*

(Prezoj en guldenoj)

| | |
|---|---|
| DIINO HERTA | 9,10 |
| DU VIRINOJ | 23,10 |
| LA BONA MESAĜO DE JESUO - Laŭ Marko | 9,10 |
| LA BONA MESAĜO DE JESUO - Laŭ Luko | 9,10 |
| LA BONA MESAĜO DE JESUO - Laŭ Johano | 9,10 |
| LA BONA MESAGO DE JESUO - Lau Mateo | 9,10 |
| PRETER LA HORIZONTO | 11,00 |
| D-RO ĴIVAGO-Poemoj | 9,10 |
| LUDOVIKOLOGIA DOKUMENTARO-I - Unuaj Libroj | 62,70 |
| LD-II - Komenctempaj lernolibroj I | 62,70 |
| LD-III - Komenctempaj lernolibroj II | 62,70 |
| LD-IV - Poŝaj lernolibroj | 62,70 |
| LD-V - Diversaj vortaroj kaj lernolibroj | 62,70 |
| LD-VI - Diverslingvaj broŝuroj | 62,70 |
| LD-VII - Legolibroj I | 62,70 |
| LD-IX - Ludovikaj adresaroj I | 62,70 |
| LD-XI - Lingvo Internacia I | 62,70 |
| LD-XII - Lingvo Internacia II | 62,70 |
| ĜIS LA HOMARANISMO | 132,00 |
| UNUA ETAPO DE ESPERANTO | 132,00 |
| DE MOLIERE AL ŜALOM-ALEJĤEM | 52,80 |
| DE PATRONIA AL ŜEIKSPIR | 52,80 |
| LA ARBO...KIU FORKURIS | 21,12 |
| LA KORMORANOJ ANKORAŬ NE REVENIS | 24,00 |
| PRAAVO KAJ LA KOTOKUKOJ | 16,50 |
| DEUTSCH-ESPERANTO (Worterbuch) | 33,00 |
| ESPERANTO-DEUTSCH (Worterbuch) | 33,00 |
| DEUTSCH-ESPERANTO (Taschen-Worterbuch) | 9,90 |
| ESPERANTO-DEUTSCH (Taschen-Worterbuch) | 9,90 |
| LA SERĈADO DE LA VIVO | 19,80 |
| MATERIALOJ PRI LA NUNA UZADO DE LA AKUZATIVO | 36,30 |
| LA FRANCA PERIODO DE ESPERANTO | 52,80 |
| WINNIE-LA-PU | 29,70 |
| METODIKO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO | 16,50 |
| MEMORI KAJ FORGESI | 35,00 |
| GEOGRAFIO DE MIAJ MEMOROJ | 37,00 |
| NEĜA LANDO | 29,70 |
| ETIMOLOGIA VORTARETO PRAGMATA DE ESPERANTO | 53,79 |
| RIKOLTO | 65,00 |
| FABELOJ DE ANDERSEN | 132,00 |
| GRAND DICTIONAIRE FRANÇAIS-ESPERANTO | 103,00 |
| POEMOJ DE ARMAND SU | 6,50 |
| LASTA CEVALO | 9,10 |

# AGENDO




12-17 JUL 93 San-Paŭlo - SP
29-a Brazila Kongreso de Esperanto

24-31 JUL 93 Valencio - HISPANIO
78-a Universala Kongreso de Esperanto

25-29 JUL 93 Ribeirão Preto - SP
54-a Tutamerika Medicina Kongreso de Homeopatio

09-11 OKT 93 Goiânia - GO
I Congresso Brasileiro de Interlinguística e Esperantologia

13-15 NOV 93 Timóteo - MG
V REVA - Renkontiĝo Esperantista de l' valoj

SAN PAULO
BKE
29ª BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

# EK AL LA KONGRESO...

Jen evento kiun la esperantistoj ne devas kaj ne rajtas perdi. Ne nur pro tio, ke niaj kongresoj nepre estu la natura forumo por pridiskutado de niaj gravaj aferoj. Sed ankaŭ pro tio, ke ni havos la bonŝancon partopreni prelegojn pri variaj temoj farotaj de ĉirkaŭ tridek gravaj prelegantoj, brazilanoj kaj eksterlandanoj. Riĉenhava programo! Ĉirkaŭ 530 aliĝoj ĝis la 26-a de junio! Turisme mirindaj ekskursoj, en unu el la plej grandaj urboj de la mondo! Solena inaŭguro je la 20-a horo de la 12-a de julio. Ankoraŭ estas tempo por via aliĝo.

Remetente: BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 03625 CEP 70084-970
BRASÍLIA - DF Telef: 061 226-1298

I M P R E S S O